

Ni firme kondamnas la militan invadon de Rusio al Ukrainio

Ni plej forte kondamnas la militan invadon de la Rusa Federacio al Ukrainio kaj postulas, ke la rusa registaro senprokraste kaj senkondiĉe ĉesigu la atakojn kaj retiru la armeon el la invaditaj lokoj.

Nia epoko estas tia epoko, en kiu la volo komuniki ion per vortoj ofte nur renkontas interpretojn kun malica intenco. Malgraŭ tio, ni, kiel esplorantoj de lingvaj fenomenoj, klare asertas, ke “la plumo estas pli potenca ol la glavo”.

La lingvaj komuneco aŭ malsameco estis daŭre utiligataj por diversaj konfliktoj. Surbaze de akra rimorso pri tio, la internacia komunumo evoluigis sistemojn por solvi lingvajn kaj kulturajn problemojn sen uzi perforton. La ĉi-foja invado de Rusio al Ukrainio estas ago piedpremi tian tendencon.

Ni esprimas nian sinceran kondolencon pro la mortintoj de la militaj atakoj kaj nian solidarecon kun ĉiuj, kiuj levas sian voĉon kontraŭ la invado. Ni ankaŭ firme pledas por tio, ke la civitanoj de Rusio ne estu senbaze kalumniataj.

Ĉiuj problemoj devas esti solvitaj per dialogoj kaj pacaj rimedoj.

Volontaj membroj de
la esplorgrupo por multlingvaj socioj,
la esplorgrupo por multlingvaj fenomenoj kaj
la redaktantaro de la gazeto „Lingvo kaj Socio” (Kotoba to Syakai)

La 4-an de marto, 2022